



Kunfesti kaj agi: “Jaro Montevideo 60”

Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

De la 19-a ĝis la 25-a de julio 2014 okazis en Montevideo, Urugvajo, la 47-a ILEI-konferenco kies temo estis Lingva justeco en praktiko: latinamerikaj spertoj kaj tendencoj.

La 47-a Konferenco de ILEI, kiun partoprenis proksime 70 geesperantistoj, celebris la 60-jariĝon de la unua rezolucio de Unesko pri Esperanto. Kadre de la strategia plano de UEA kaj ĝia ĉefmotivo, la lingva justeco, ILEI prikonsideris la principan gravecon de ambaŭ Uneskaj rezolucioj pri Esperanto, (Montevideo, 1954, kaj Sofio, 1985), kaj iliajn praktikajn utilojn kaj utiligojn por la E-movadaj celoj kun precipa atento pri la spertoj kaj tendencoj en Latinameriko kiel gastiganto de la Konferenco kaj UK en la jubilea jaro. Du urugvajaj ministerioj kaj aliaj institucioj oficiale deklaris sian apogon al la Konferenco.

Kiel rezulto de la konferenca laboro, ILEI deklaris la jaron 2014 kiel jaro de “Montevideo 60” kiu sekve estis akceptita de la Komitato de UEA en Bonaero kiel celebrinda internaciskale.

Ankaŭ vi povas partopreni en la agado “Jaro Montevideo 60”, al kiu UEA invitas lige kun la 60-a datreveno de la rezolucio pri Esperanto. Por sukcesigi la kuncelebradon, jen kelkaj sugestoj:

Individue partopreni en la Internacia Legoklubo de la Jaro (lanĉota en decembro). **Loke**, organizi prelegojn, seminariojn, kursetojn pri aspektoj de la E-kulturo kaj ĝia evoluo dum la lastaj sesdek jaroj. **Lande**, verki artikolojn pri 60 jaroj de Montevideo en revuoj, kaj aliaj amaskomunikiloj, intervjuoj kun veteranaj esperantistoj kaj nuntempaj gvidantoj pri la lastaj 60 jaroj.

Jen invito farita al ni ĉiuj por kune festi kaj agi okaze de la 60 jaroj de Montevideo favore al Esperanto.

Kunfesti kaj agi

Jaro Montevideo
60

Kelkaj eblaj agadoj por la “Jaro Montevideo 60”

Konsciigo

Kapabligo

Individue
Partopreni en la Internacia Legoklubo de la Jaro (lanĉota en decembro).

Loke
Prelegoj, seminarioj, kursetoj pri aspektoj de la E-kulturo kaj ĝia evoluo dum la lastaj sesdek jaroj.

Lande
Artikoloj pri “60 jaroj de...” en revuoj, blogoj k.s.; intervjuoj kun veteranaj esperantistoj kaj nuntempaj gvidantoj pri la lastaj 60 jaroj.

Internacie
Elsendoj de radiostacioj kaj retradioj pri similaj temoj; enketoj pri la “dek plej bonaj...” (romanoj, kantoj, lernolibroj, retejoj ktp...) el la lastaj 60 jaroj.

Individue
Kunlabori en la verkado, tradukado kaj eldonado de multlingvaj informiloj pri Esperanto en la kunteksto de UN kaj Unesko.

Loke
Partopreni en la gazetara kampanjo ĉirkaŭ la 100-a UK kaj per budoj/standoj en lokaj kulturfestivaloj, lingvofestoj kaj simile, kun emfazo pri la atingoj de la lastaj sesdek jaroj. Disvolvi ĝemelurban agadon kunlige kun la Jaro.

Lande
Informi kaj inviti Unesko-respondeculojn kaj aliajn sociajn agantojn al kulturaj/sciencaj/klerigaj aranĝoj tra la jaro. Varbi “amikojn de Esperanto”.

Internacie
Kunlabori en “esenca vikipedioto de Esperanto” por neesperantistoj – bazaj faktoj, interesaj rakontoj, ilustraj bildoj pri niaj ĉefaj atingoj el la lastaj 60 jaroj, verkitaj en Vikipedio kaj tradukitaj en multajn lingvojn.

Komunumo

Individue
Partopreni en internacia projekto pri edukado, scienco aŭ kulturo – ekzemple la esperantigo de elstaraj eldonadoj rekomendataj de Unesko.

Loke
Kontribui al diskutoj pri la kongresa temo, prepare al la kongreso en Lillo.

Lande
Almenaŭ unu kultura festivalo aŭ granda kultura programo: tumeoj de artistoj, verkistoj, aktivuloj (datumbazo pretigata kunlaboro kun TEJO k.a.).

Internacie
En la 100-a Universala Kongreso, aparte riĉa kultura programo kun speciala atento al kino, muziko, teatro; lanĉo de novaj internaciaj projektoj.

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 2015

La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA, invitas partoprenantojn por la 66-a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 100-a Universala Kongreso en Lillo. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en la UK nek al membreco en UEA. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, escepte de la branĉo Infanlibroj. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Validas krome la jenaj kondiĉoj:

Poezio: maksimuma longo ne fiksita

Prozo: maksimuma longo 200 x 65 karakteroj (kvino da paĝoj)

Teatraĵo: maksimuma longo ne fiksita

Eseo: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj; proksimuma longo 400 x 65 karakteroj (deko da paĝoj). La unua premio nomiĝas Luigi Minnaja.

Infanlibro de la Jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2014. Unu premio.

Ĉiujn konkursaĵojn en la branĉoj Poezio, Prozo, Teatraĵo kaj Eseo oni sendu rete al la sekretario, indikante la elektitan pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro. La absoluta limdato por ricevo de konkursaĵoj estas la 31-a de marto, 2015. Nur se reta sendo ne eblas, oni sendu unu paperan ekzempleron al: Belartaj Konkursoj de UEA, sekretario Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio.

Por la Branĉo Infanlibro oni sendu tri ekzemplerojn de la konkerna libro al: Ionel Onet, Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, kun la indiko “Por Belartaj Konkursoj” kaj unu al la adreso de la sekretario.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 556

KIU ESTAS KIU INTER NI

NIAJ HONORAJ MEMBROJ (III)

Ricardo SALAZAR CRESPO

Juan R. RODRÍGUEZ GÓMEZ

Li naskiĝis en Florida (Camagüey, Kubo) la 26-an de majo 1947 kaj, kiam li estis preskaŭ 18-jara (aprilo 1965), li eklernis Esperanton en tiu urbo, sub la gvido de la instruanto Víctor RODRÍGUEZ COFFIGNY.¹ Nur du monatojn poste, en junio 1965, li konatiĝis kun Raúl JUÁREZ SEDEÑO (tiutempe Peranto de UEA en Kubo), el kio fontis longdaŭra amikeco.

La sekvan jaron (1966), li transloĝiĝis al Cascorro (en la sama provinco) kaj tie, izolita, li daŭrigis memlernadon de Esperanto ĝis iom poste, kiam li sukcesis malfermi E-kurson kaj instrui la lingvon al dekoj da personoj, laboro kiun li ankaŭ faris dum aliaj jaroj, sed en tiu etapo li nur atingis kapti E-interesitojn, kiel amikaro, ĉar ŝajnas ke ili ne celis serioze entrepreni la aferon, kaj la ideo fini kurson ĉiam restis ĉe li kiel revo.

Meze de la dua semestro 1979, li aliĝis al la ĵusnaskita Kuba Esperanto-Asocio kaj, en septembro 1981, li malfermis alian kurson kun pluraj homoj, el kio rezultis la unuaj 14 finlernintoj de la baza kurso, kiuj ricevis diplomon post fini la trian nivelon, en junio 1982. Krome, en tiu jaro, li aliĝis al UEA kiel Individua Membro.²

Pro la tiama laboro farita, la 20-an de novembro 1983, dum la okazigo de la 1a Tutlanda KEA-Asembleo), li estis elektita kiel Honora Membro de KEA, proponite de JUÁREZ SEDEÑO.³

Post tiu elekto, li daŭre instruadis diverstipajn E-kursojn kaj prezentis plurajn ekspoziciojn pri la IL en Cascorro; partoprenis en la Unua KEA-Kongreso (decembro 1987), la 75-a UK (Havano, 1990) kaj direktis sian agadon ankaŭ eksterlanden.



La E-Grupo de Cascorro dum kunsido kun partopreno de estraranoj (Santillán kaj Dumois) de la Provinca Filio Camagüey en 2006. De maldekstre: Ricardo Salazar Crespo, Jorge Luis González Santillán, Roberto Molina García, Jorge Dumois Santillán.

En 1998, li vojaĝis tra ses europaj landoj, kie li prelegis, vizitis universitatojn, interkonatiĝis kun pluraj esperantistoj, partoprenis en la 83-a UK (Montpeliero)...

“Esperanto alportis al mi multnombrajn bonaĵojn, feliĉigis/as mian ekziston, malfemis novan mondon, pliampleksigis mian ĝeneralan kulturon, kaj konatigis al mi diverslandajn kaj specialajn geamikojn”, laŭ liaj propraj vortoj, post ĉeesti la NASK-Kursaron 2013, en Usono.⁴

¹ Jorge L. González Santillán: Historia del Movimiento Esperantista en Camagüey (Historio de la E-ista Movado en Camagüey), 1997, p. 11.

² Ricardo Salazar Crespo: “Esperanto: homa mirindaĵo”, en La NASKa Fasko, la 4-an de julio 2013, Usono, p. 2. Ĉi tie, mi ankaŭ aldonas detalojn aperintajn en membiografieto skribita de li, hispanlingve, fine de 1987.

³ Protokolo de la 1-a Tutlanda Asembleo, okazinta 18-20 novembro 1983, Nacia Kapitolo, Havano.

⁴ Salazar Crespo: Op. cit., p. 2. (NASK estas Nordamerika Somera Kursaro).

Terminologia Somera Kurso en Vieno

Ariadna GARCÍA GUTIÉRREZ

Esti inter la du gajnintoj de la internacia konkurso lanĉita de UEA por partopreni terminologian someran kurson en Vieno, Aŭstrio, estis granda surprizo por mi, kaj sendube plezura, ĉar tamen defia! Mi multe dankas al tiuj kiuj ebligis mian partoprenon kaj fidis je mi. Certe mi ne povis imagi kiel profunda interrilatiĝo ekzistas inter mia universitata studfako kaj terminologio, kio multe ĝojigas min, ĉar dank’ al tiu mi nun havas pli konkretan bildon pri kiel prepari projekton por la Terminologia Komisiono de UEA, kies membro mi estas, kaj tio realiĝis danke al tiu ĉi kurso. Mi povis konstati ke, ĉefe partoprenis homoj kiuj jam havas spertojn kiel tradukistoj aŭ fakuloj pri tradukado; ankaŭ partoprenis spertuloj pri kiel organizi terminologiajn sistemojn pere de datumbazo kiel TBX.

Entute estis 78 partoprenantoj el 27 landoj, inter ili tre spertaj universitataj instruistoj pri lingvoj, teknologio, terminologiaj studoj, komunikado, interaliaj.

La ĉeftemo estis Terminologia Manaĝado, en kies kadro troviĝas pluraj aspektoj kiuj devas esti priatentitaj antaŭ prezenti Terminolo-

giajn Projektojn, kiel ekzemple mousubtenantoj, planado de la projekto, elspezoj kaj profitoj. Krome, gravas prilabori metadatumojn, lingvo-politikojn kaj normigadon, pere de teama laboro kie evidentiĝu motivoj, eblecoj kaj maleblecoj. Kial bezonatas atenti la terminologian laboron ankaŭ ene de la esperanta komunumo? Precipe ĉar tio signifas evolui kiel asocio je internacia nivelo, diskonigi kaj evoluigi nian lingvon: Esperanto, profesia komunikado je supera nivelo. La agado pere de terminologiaj programoj por traduki aŭ interŝanĝi datumojn helpas nin havi la informojn ordigitajn kaj klasifitajn por kompreni kial kaj por kio la organizo produktas tiujn informojn, kaj kiu(j) produktas ilin.

Terminologia laboro devas baziĝi sur kolektado, priskribado kaj ofta enprocezo, ĝi plifaciligas la laboron al aliaj fakuloj, t.e. malpli da tempo kaj bonaj rezultoj. Reakirado de informoj ĉiam estas tikla temo en ĉiuj organizoj, pro tio vere gravas krei kaj konservi laborfluojn pere de kiuj eblu analizi normigitan kaj ne duobligitan terminologian sistemon. Tiaspeca strategio vere influos en la procezo por reakirado de informoj, tial ke ĉiuj devas kompreni la samon ekde ĉiuj vidpunktoj. Gvidi terminologian entreprenon signifas atenti pri bezonoj kiel ekzemple, reklamoj, financaj raportoj, retpaĝoj, kontaktoj. Ne eblas krei novajn konojn sen ter-



minologia laboro, ĉar ĝi signifas ne nur specialecon, sed ankaŭ sciencon, en kiu ne nur gravas terminoj, sed ankaŭ la konceptoj kiujn reprezentas tiuj terminoj.

Malfacilas klarigi al homoj la gravecon de Terminologio kaj la profitojn kiujn alportas bona praktiko rilate termino-kreadon, kio helpas redukti la ĉiutagajn informfluojn kun kiuj organizoj devas labori. Por tio, estas esence havi komunikajn kaj lingvistikajn konojn, ĉar fakte ili estas orientitaj al tiuj informfluoj.

Do, ni klopodu terminologie kaj teame labori por daŭre evoluigi ne nur nian lingvon, sed ankaŭ niajn labormanierojn.

Belarta konkurso Arto estas mi



La Martí-Klubo "Patrio estas Homaro" invitas vin partopreni Belartan Konkurson

"Arto estas mi..."

Rajtas partopreni ĉiuj esperantistoj, en 2 branĉoj: poezio kaj prozo.
Poezio maksimuma longo: 2 paĝoj.
Prozo maksimuma longo: 4 paĝoj.

Oni rajtas sendi nur du konkursaĵojn por sama branĉo.

Oni sendu ilin en du ekzempleroj al: Ismary Lezcano García; Vista Alegre 264 entre Juan Bruno Zayas y Luz Caballero; 10 de Octubre.

Ĉiuj alvenu plej laste la 31an de decembro 2014. Vi devas meti nomon kaj familinomojn, identokarton kaj kompletan adreson.

Estos tri premioj en kubaj pesoj (CUP):

Unua Premio (poezio 200.00, prozo 300.00); Dua Premio (poezio 150.00, prozo 200.00); Tria Premio (poezio 100.00, prozo 150.00).

La 30-an de januaro oni informos la rezulton dum la 31-a Komitatkunsiĉdo de KEA.

La premiitaj verkoj aperos en la bulteno *esperanto.cu*.

Tra la spuroj de niaj klasikuloj:

Antoni GRABOWSKI



La tiel nomata patro de la esperanta poezio naskiĝis la 11-an de junio 1857 en Nowe Dobra apud Culm an der Weichsel (hodiaŭ Chełmno) kaj mortis la 4-an de julio 1921 en Varsovio. Li estis pola kemiisto-inĝeniero de prusa ŝtataneco kaj frua Esperanto-aktivulo, kiu precipe per siaj tradukoj grave influis la evoluon de la Esperanta literatura lingvo.

En la jaro 1887 li aĉetis kaj trastudis la freŝe aperintan libreton *D-ro Esperanto. Internacia Lingvo. Antaŭparolo kaj plena lernolibro* en kiu L. L. ZAMENHOF prezentas sian lingvoprojekton, kiu baldaŭ konatiĝos sub la nomo "Esperanto". Forte impresita de ties travidebla strukturo kaj surprize rapide akirebla esprimkapablo li vojaĝis al Varsovio kaj vizitis ZAMENHOF-on; en tiu tago okazis inter ili la unua buŝa dialogo en Esperanto.

Same kiel Zamenhof, Antoni GRABOWSKI plene konsciis pri la signifo de la literaturo en la evoluo de lingvoj kaj despli de Esperanto, kiu ekpaŝis sur la vojo de lingvoprojekto al lingvo plene funkcia en ĉiuj sferoj de la vivo. Grabowski jam baldaŭ ekagis; en 1888 aperis lia traduko de "La neĝa blovado" de Aleksandr Puŝkin. En la jaro 1889 sekvis "La gefratoj" de Johann Wolfgang VON GOETHE.

Inter la plej elstaraj verkoj de GRABOWSKI estas lia traduko de la pola patriota epopeo *Sinjoro Tadeo* de Adam MICKIEWICZ. Ĝin GRABOWSKI rekreis formfidele, elprovis latentajn eblojn de la lingvo kaj tiel donis gravajn impulsojn al la plua evoluo de la esperantlingva poezio.

Antoni GRABOWSKI ankaŭ postlasis al ni gravan originalaĵojn; jen la konata kaj bela poemo "La Tagiĝo".

*Agordu la brustojn, ho nia fratar',
Por nova, pli vigla jam kanto!
Ĝi sonu potence de montoj al mar',
Anoncu al ĉiu dormanto:
– Tagiĝo, tagiĝo radias en rond',
La ombroj de nokto forkuras el mond'!*

*Ni velas antaŭen kun kredo, fervor',
Benante la Majstron por verko,
Kaj lian anaron, de plej frua hor'
Fidelan al li, ĝis la ĉerko.
– La mond' aliĝos, la temp' pasos for,
Sed vivos eterne pri ili memor'.*

*Post longa migrado sur dorna la voj'
Minacis nin ondoj de l' maro;
Sed venkis ni ilin kaj velas kun ĝoj'
Al verda haven' de l' homaro.
– Post longa batalo, maldolĉa turment',
La stela standardo jam flirtas en vent'.*

*La lingvo benata montriĝis al ni
Mirinda donaco ĉiela:
Per amo al hejmo, patrujo, naci',
Ni flamas en koro fidela.
– Kaj same fidela; al hejma altar',
Ni sentas nin filoj de l' tuta homar'.*

*Se venus ankoraŭ ventegoj, batal',
Ni estas jam bone harditaj;
Esperon ne venkos la fajro, nek ŝtal',
Nek ies perfidoj subitaj.
– Nenio en mondo elŝiros ĝin for,
Ĝi havas radikojn profunde en kor'.*

*En ĉiu mondparto, en ĉiu terzon'
En koroj de centoj da miloj,
Jam vibras por nia saluto reson',
Do kantas de l' tero ni filoj:
– Tagiĝo, tagiĝo radias en rond',
La ombroj de nokto forkuras el mond'!*

Kion mi faras por esperanto?

Ariadna GARCÍA GUTIÉRREZ

★ Ne nur temas pri kion ni faras por Esperanto, sed ankaŭ kion ni faras por nia movado, por antaŭenigi ĝin. Tiusence, mi klopodas kiel eble plej multe aktivi, ekde landa kaj eksterlanda vidpunktoj. Starigi kaj flegi internaciajn kontaktojn multe gravas, ĉar tio ja ebligas al la esperanta mondo, konatiĝi kun la loka agado de nia asocio ★ Junularo estas unu el la ĉefaj iloj de nia movado, kaj tiusence, ekde 2010 kiam mi estis taskita organizi la 66-an Internacian Junularan Kongreson en Kubo kaj varbi kiel eble plejmulte da gejunuloj interesitaj en nia lingvo, mi klopodas strategie agi kaj lerni de nia supera organizo TEJO motivigi la kubajn gejunulojn. ★ Ĝisnunaj atingoj eblas rimarki unue kun la kreado de la Nacia Aranĝo de la Junularo – JuSKA: Junulara Somera Komuna Aranĝo, starigo de revuo kiu informas pri la ĉefaj agadoj de nia sekcio, kies nomo estas: "POR VI", kiu prezentas artikolojn pri interesaj temoj por la junularo. ★ Menciindas la aktiviga sento estiĝinta ekde la kuba IJK ĝis nun, kiam pluraj gejunuloj aliĝis al nia movado kaj ĝuas esperantistan etoson. Pro tio mi vere ĝojas kaj daŭre agas pere de amaskomunikiloj kiel Radio Havano Kubo en Esperanto, nia internacia radiostacio kiu raportas pri la kubaj okazaĵoj, landaj kaj movadaj; mi kunlaboras kun la podkasto *Varsovia Vento* kaj *Muzaiko*; verkas por la kuba bulteno *esperanto.cu*, por la internaciaj gazetoj Kontakto kaj Esperanto; daŭre laboras por la realigo de nia 3-a Junulara Somera Komuna Aranĝo 2014 kaj preparas Aktivulan Trejnadon pri Organizado de Eventoj ★



KEA en internaciaj eventoj

Montevideo aktiva: amika kaj instrua

La 47-a Konferenco de ILEI okazinta de la 19-a ĝis la 25-a de julio 2014 en la urugvaja ĉefurbo, celebris la 60-jariĝon de la unua rezolucio de Unesko pri Esperanto kaj traktis kiel ĉeftemon “Lingva justeco en praktiko: latinamerikaj spertoj kaj tendencoj”.

La konferencon partoprenis proksimume 70 geesperantistoj de pli ol dek landoj kaj sesiis en moderne ekipitaj salonoj de la belega konstruaĵo de Ateneo, en la urbocentro. Ateneo estas longtradiicia urugvaja kultura institucio fondita en la jaro 1886. La programo inkluzivis klerigajn erojn, laborkunsidojn, diskutesiojn, lingvan festivalon, simpozion pri la konferenca temo, ekskursojn kaj vesperan distran programon, kiu regalis nin per vere internacia kultura programo.

Inter la plej elstaraj momentoj estis la lingva festivalo okazinta en placo situanta fronte de la Ateneo meze de tre malvarma temperaturo, kiu ne haltigis la entuziasmon de la partoprenantoj dum la prezento de la respektivaj lingvoj. Oni disdonis flugfoliojn pri Esperanto kaj respondis demandojn de la interesitoj kiuj alproksimiĝis.

La simpozio pri la konferenca temo havis elstarajn prelegantojn, inter ili la prezidanto de UEA, Mark FETTES. Mi havis la okazon prelegi, kadre de la simpozio, pri la kuba alfabetiga programo “Mi ja povas”.



Sendube, la ekskursiva programo estis ege bela kaj memorinda. Urugvajo proponis abundon da historiaj, kulturaj kaj geografiaj vidindaĵoj kiel ekzemple: vidindaĵoj de Montevideo mem kaj Colonia del Sacramento, antaŭurbo de la fina momento por la konferencanoj, ĉar de tiu punkto ekis nia kuna vojaĝo al la ŝiphaveno de kie startis nia ŝipo al Bonaero. Bela fino de fruktodona renkontiĝo amika, kolegeca kaj instrua!

Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

70-a Internacia Junulara Kongreso Fortalezo 2014: senhalte paroli kaj vivi Esperanton

De la 18-a ĝis la 25-a de julio 2014, okazis en Fortalezo, urbo situata en la nordorienta regiono de Brazilo, la 70-a Internacia Junulara Kongreso. La aranĝo kun ĉefa temo “Esperanto kaj Interreto: iloj por senbara interhoma konekto”, estis motivo por ke gejunuloj el 26 landoj renkontiĝu tie. Per ĝojiga Kultur-Lingva Festivalo en publika placo, homoj el Kubo, Meksiko, Rusio, Francio, Japanio, Ĉinio, Usono, Pollando, Kolombio kaj Italio prezentis sian landon en diversaj budoj.



Tiel la kongresanoj diskonigis informojn kaj varojn pri siaj devenregionoj, muzikis kaj altiris la amaskomunikilojn. En la Komitatkunsidoj de TEJO ĉefrolis la temo restarigo kaj antaŭenigo de la Amerika Komisiono, gravega por niaj Landaj Sekcioj kaj kontinento. AMO-Seminario (Aktivula Maturigo) celis kapabligi la partoprenintojn pri hom-mastrumado, teamlaboro, trejnado pri kreemo, kiel efike varbi pri Esperanto, celfiksado kaj strategi-kreado.

La scienca programero estis spektinda kaj artaj vesperoj estis mirindaj. La etoso en la kongreso estis pli familia ol en aliaj jaroj, homoj estis pli proksimaj: tion rimarkigis kelkaj personoj kiuj ĉeestis jam plurajn IJK-ojn.

En mia unua internacia esperantumado mi sentis min bonege, ĉar dum tuta monato mi senhalte parolis kaj vivis Esperanton. Mi estas unu el la ĉijaraj gajnintoj de la konkurso de TEJO (legu revuon *Esperanto*, majo 2014) kaj tio permesis al mi vojaĝi al Brazilo, lando de la IJK.

Mi laboris kiel helpanto en la IJK-teamo kaj pro tio mi havis la ŝancon konatiĝi kaj babili kun ĉiuj kongresanoj, skajpumi kaj komunikiĝi kun klasoj en Usono kaj en Rusio, prelegi pri JSKEA kaj ties aranĝoj. Mi aktivis dufoje sur scenejo en la artaj vesperoj, gitarumante kaj estis intervjuita poste de loka televidkanalo.

Post la fino de IJK mi restis en Cearaa E-Asocio kie geesperantistoj dorlotis min kvazaŭ filo kaj tiam mi prelegis pri Kubo, vizitis klason de Esperanto en la apuda urbo Itaitinga, kunkoncertis kun Klubo de Muzikistoj en la evento ABC (Alemanha, Brasil, Cuba), renkontiĝis kun gelernantoj el du lernejoj en Caucaia kaj alproksimiĝis al ili nian kulturon, partoprenis en kulturcentro Dragão do Mar en Poliglota Klubo kie Esperanto ankaŭ estis parolata.

Tiel post tiom da belaj travivaĵoj kaj postlasi ĉion, mi lernis brazilan vorton kiu estis esperantigita kaj de tempo al tempo venas al mi tiu sento. Ĝi estas saúdado (saudade en la portugala): mikso de sento, inter sopiro, manko, nostalgio, kaj aliaj.

Geomar MARTÍNEZ PÉREZ



La 99-a Universala Kongreso de Esperanto

La 99-a Universala kongreso de Esperanto, okazinta en Bonaero de la 26-a de julio ĝis 2-a de aŭgusto, estis kongreso de ekstremoj. Unue ĝi estis tre malgranda, nur 706 registritaj aliĝintoj, kiun nombron subis nur la kongresoj en 1905, 1910, 1915 kaj 1920, do antaŭ tre longe. Mankis multaj konataj figuroj, kiuj kutimas umi en kongresoj lasta-tempaj: Humphrey TONKIN, Renato CORSETTI (kvankam ili aliĝis), Michaela LIPARI, menciante nur kelkajn. La longa vojaĝo (jes, iom laciga) eble fortimigis multajn. Tamen lokaj kostoj estis malpli altaj ol en multaj eŭropaj kongresuroj. Kompense ĉeestis multaj latinamerikanoj, kiuj donis ian apartan guston. La angla ne estis multe parolata ekster la plej luksaj hoteloj, do, mi provis travivi per la hispana kaj eĉ ne multe provis per la angla. Krome, laŭ diskutoj postkongresaj en Fejsbuko, grandan parton de kongresanoj trafis kongresa gripo, ja en Argentino estis vintro kun tiuepokaj malsanoj.

La kongresejo, Hotelo Panamericano

Malgraŭ la malgrandeco de la kongreso la aferoj okazis en tri ĉefaj ejoj. La ĉefa kongresejo Panamericano estis tipe luksa hotelo kun funkciaj ejoj. Movada foiro okazis en alia hotelo kaj multaj solenaĵoj kaj kulturaj prezentadoj en la teatro Metropolitan. Kontrolado de eniroj estis eĉ pli strikta ol kutime: necesis apartaj biletoj por eventoj en Metropolitan, krome la biletoj por la fermo estis haveblaj nur en la dua duono de la semajno. Tamen la ejoj estis taŭge elektitaj, tiel ke senteblis, ke ili estas plenaj, kaj foje eĉ mankis lokoj.

La urbo mem similas iomete la diversajn mez-orienteŭropajn ĉefurbojn, aŭ eble Ruslandon en la 1990-aj jaroj: unuflanke pompaj klasikstilaj konstruaĵoj de antaŭ jarcento, kelkloke tute pompaj modernaj vitraj ĉielskrabantoj kaj ankaŭ signoj de ekonomiaj problemoj, homoj dormantaj surstrate, truoj en balustradoj. Kaj en turismaj lokoj daŭra kriadado de monŝanĝemuloj, pli bona kurzo sed

ankaŭ risiko ricevi falsan monon. Dum la kongresa semajno la Argentina ŝtato estis deklarita nepagipova rilate siajn eksterlandajn ŝuldojn, sed tio neniel videblis surstrate; manifestacioj, jes, certe, sed ili okazis konstante pri ajna temo. Eble pro malbona ekonomia situacio ne okazis urbestra akcepto. Mankis ankaŭ aliaj kutimaj programeroj, i.a. plene forgesiĝis programero pri la belartaj konkursoj, nu, ne ĉeestis multaj el la gajnintoj (la nomoj estis legitaj dum la fermo).

Necesis improvizi en pluraj aliaj programeroj. Aŭkcio ja okazis malgraŭ manko de la aŭkciisto TONKIN. La rezervaj kandidatoj Mark FETTES kaj José Antonio VERGARA malfeliĉe interkonsentis samtempe ĉeesti en kunsido, kaj rezultis, ke Osmo BULLER devis aŭkcii. Malgraŭ sia senkulpigo, ke kiel finno li ne povas fari similajn piroteknikaĵojn kiel Humphrey, la aŭkcio tamen pasis tre bone. La plej multekosta kaj dezirata ŝajnis esti la aliĝnumero unu por la venontjara kongreso, kiun gajnis Synnöve MYNTTINEN el Finnlando, kiu tamen donacis ĝin al la prezidanto de la LKK de la venonta UK.

Nu, ne mankis emociaj momentoj. La inaŭgura parolo de Mark FETTES estis tute brila, same emocia la akcepto de la kongresa flago fare de la LKK-prezidanto de la 100-a UK, kaj la monda premiero de la serba filmo *Laŭ la spuroj de Tibor SEKELJ* (kun Esperantaj subtekstoj), kiun filmis du serbaj filmistoj en Suda Ameriko vizitante lokojn, kie SEKELJ vizitis. Por sportemuloj io tute nova estis la organizo de futbalmatĉo de rapide kunmetita Esperanta teamo kontraŭ armen-devena argentina teamo. Nu, ĉar la Esperanta teamo apenaŭ provludis, la rezulto estis 8-3 por la argentina teamo.

Francisco VEUTHEY, nederlanda argentinano, al kiu oni atribuis la unuan ideon okazigi la kongreson en Bonaero, prelegis pri la historio de Argentino mikante la erojn el sia familia historio kun la historio de la lando. Nu, historio ne estas facila afero, kio rimarkeblis en komentoj de preleganto pri eventulaj aliaj opinioj de ĉeestantaj argentinaroj, aŭ ke kiam preleganto diris ke Britio atakis Argentinon dufoje, el la publiko iu kriis: "tri".

La Esperanto-teamo

Preskaŭ mankis kritiko ĉe kutimaj "plendokunsidoj" Estraro respondas kaj Centra Oficejo respondas. Ŝajnas ke la membraro, aŭ almenaŭ tiu parto, kiu venis al Bonaero, havas grandajn esperojn kun la nuna estraro de Mark FETTES. La prezidanto mem konstatis, ke ne ĉio iris tiel bone kiel planite: Konsilio, kiu estis planita por helpi estraron, ne funkciis laŭ deziroj, estraraj teamoj ŝajnas funkcii malpli bone ol individuaj estraranoj, almenaŭ se pensi pri la malfruo de la jarraporto, kio ne okazis eĉ en jaroj, kiam la asocio estis multe pli kriza ol nun. La tuta agadkampo estas reformulita



kaj aspektas iom malsama ol antaŭe, ekzemple, la loko de kulturo, almenaŭ se paroli pri libroj, restas en la nova strukturo de konsciigo, kapabligo, komunumo iom neklara. Aperis kritikoj, ke tradiciaj kaj sukcesaj agadkampoj kaj kongresaj programeroj forfalas dum atenton prenas novaj agadoj, ĉu same sukcesaj?

La kongresa libroservo

En movada flanko la plej grava novaĵo estis ke la komitato akceptis post multjara diskutado la regularon por reta voĉdonado, kiu ebligis al la komitatoj voĉdoni rete kaj ne nur en kunsidoj dum UK. Ĉu el tio realiĝos pli bona konsultado de estraro kun la komitato, videblas ene de kelkaj jaroj?

Ankaŭ la kongresaj tagoj ricevis novajn nomojn surbaze de la nova laborplano: tago de konsciigo, tago de kapabligo, tago de komunumo kaj tago de kunordigo. Tamen, ĉe la programero Tago de kapabligo iu skribis la afiŝon Tago de lernejo. Longaj tradicioj malaperas malrapide. IKU-prelegoj fokusiĝis al tre diversaj temoj de lingva justeco al pliacidigo de oceanoj, sed IKU-libro aperis en inversigita paĝordo, tiel ke la paĝo unu estis ĉe la fino.

La ĉefa kritiko tamen venis ĉe la programero Legantoj de *Esperanto*, kie la nova redaktoro Fabricio VALLE longe klarigis sian eksperimentadon kun la tradicia revuo. Temis pri kritiko pro tro malgrandaj literoj. VALLE promesis korekti multajn aliajn aferojn, ekzemple tro akrajn kolorajn fonojn ĉe tekstoj, sed ne la grandecon de literoj. VALLE eksperimentis siajn kapablojn ankaŭ kiel redaktoro de la *Kongresa Kuriero*, kiu tamen fariĝis nur dupaĝa. Nu, ne nepre pro la malgrandeco de la kongreso, sed pro maltalenteco de la redaktoro



ro, kiu esperis, ke venos amase materialoj, sed mem fakte verkis tre malmulte. Laŭ la kritiko aperinta en la *Kuriero* mem temas pri kurieroj “sensukaj, seninteresaj kaj malprofesie produktitaj”, tamen ne nur rilate la kurieron de Bonaero sed ankaŭ ĝenerale.

Jukka PIETILÄINEN

Fotoj de Stanislav BELOV
El: *La Ondo de Esperanto*

Rezolucio de la 99-a Universala Kongreso de Esperanto

Ni, 706 partoprenantoj en la 99-a Universala Kongreso de Esperanto, venintaj el 57 landoj de ĉiuj mondopartoj al Bonaero, Argentino,

Diskutinte en pluraj sesioj pri la temo “Ĉu la nepoj nin benos? Strebaj al daŭripova estonteco”;

Konstatinte, ke Esperanto reprezentas plene aktualan strebodon, kun evidentaj ligoj al aliaj esencaj agadoj kadre de la nuntempaj tutmondigaj tendencoj,

ke la celado al sanaj, daŭripovaj socioj, bazitaj sur paco, justeco, demokratio kaj ekonomio servanta al la homoj kun respekto al la vivosubtenaj sistemoj de la naturo, kongruas al la interkultura solidareco kiu ĉiam motivis la Esperanto-movadon,

kaj ke en la diversaj aliroj al daŭripovo ofte mankas sufiĉa atento al la ligo inter la lingvaj demandoj kaj aliaj esencaj agadoj, kio donas al ni la taskon daŭre kaj pli efike labori tiukampe;

Alvokas ĉiujn subtenantojn de Esperanto fari ĉion eblan por plenumi nian apartan rolon kiel movado por justa, konscia multlingvismo, kaj viciĝi inter la diversaj sociaj movadoj por interkultura kaj kontraŭdiskriminacia edukado, homaj rajtoj, naturprotektado, popola klerigado, rimedoŝparaj vivstiloj kaj aliaj;

Deklaras, ke la valoroj necesaj al la konstruado de daŭripova monda socio estas kernaj valoroj de nia movado, ĉar mondo, en kiu Esperanto daŭre havos sencon, estos mondo, kiu ekonomie kaj ekologie, politike kaj kulture, konservas diversecon, pacon kaj justecon.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, 2014, N-ro 550



**100^a Universala
Kongreso de
Esperanto**

Lillo, 25 julio–1 aŭgusto 2015

Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj 25 julio – 1 aŭgusto 2015

La nordfranca urbo Lillo gastigos la 100-an Universalan Kongreson de Esperanto en la jaro 2015. La Estraro de UEA decidis pri la loko de la jubilea UK en la lasta tago de sia kunveno, kiu okazis de la 22-a ĝis la 24-a de marto en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Inviton pri la okazigo

de la 100-a UK en Lillo faris Unuiĝo Franca por Esperanto.

Lillo estas la ĉefurbo de la regiono, en kiu situas ankaŭ Bulonjo-ĉe-Mar. La urbo de la unua UK, tamen ne havas la necesajn kondiĉojn por konsiderinde pli granda kaj ankaŭ laŭ sia programo alispeca evento ol

tiu en 1905, dum la kongresejo Lille Grand Palais en la regiona ĉefurbo fariĝis populara ejo de plej diversaj grandaj kongresoj, foiroj kaj aliaj eventoj. Tamen, dum la 100-a UK okazos tuttaga ekskurso al la proksima Bulonjo-ĉe-Mar.

Universala Kongreso de Esperanto estas unu el la plej longedaŭraj kongresaj tradicioj en la mondo. La jubilea UK en Lillo portos la numeron 100, ĉar dum la Unua kaj Dua Mondmilitoj UK ne povis okazi.

La kongresa temo de la 100-a UK estos Lingvoj, artoj kaj valoroj en la proksimiĝo de kulturoj. Ĝi ligiĝas al la okazanta Jardeko por la Proksimiĝo de Kulturoj (2013–2022) de Unesko kaj emfazas la historian rolon de la UK en evoluigo de la Esperanto-kulturo. Apud la ofta lingva temero, oni verŝajne unuafoje eksplicite mencias en la kongresa temo arton.

MOVADA EVOLUO: NOTICARO



FRANCINO INTER NI. La franca esperantistino s-ino Denise Happi Fosso vizitis Kubon de la 29-a de aŭgusto ĝis la 9-a de septembro 2014, ŝi revenis en Kubon post 9 jaroj kiam ŝi unuafoje vizitis la insulon, do ĉi-foje Denise partoprenis la E-vivon de Kuba Esperanto-Asocio, la 5-an de septembro vespere, tiam ŝi restis tre kontenta kaj ravita flanke de la geesperantistoj kiuj bonvenigis ŝin ĉe la sidejo. S-ino Denise Happi Fosso estas emeritulino de la Francaj Fervojoj kaj apartenas al la Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj (IFEJ), kiuj intencas kongresi en Havano, majo de 2017. Nun Denise prelegas en diversaj francaj urboj pri la neforgesebla vizito al Kubo dum la jaro 2014. / Miguel Ángel GONZÁLEZ ALFONSO

AKTIVULA TREJNADO. La Unua Sesio de la Aktivula Trejnado gvidita de Ariadna García Gutiérrez en la Nacia Sidejo de KEA, okazis la 15-an de septembro kaj ĝin partoprenis membroj de la Laborkomisiono por la Junulara Renkontiĝo JuSKA 2014 okazonta oktobre en provinco Camagüey. Tiu ĉi unua sesio estis bona kaj fruktodona momento, ĉar ne estis simpla prezento pri spertoj rilate la organizadon de evento, sed ankaŭ estis interŝanĝo de ideoj, proponoj, komentoj kaj sugestoj por sukcesigi la junularan renkontiĝon. / Ariadna GARCÍA GUTIÉRREZ

FUTBESP: PORDO AL JUNULA MONDO. En la provinco Granma naskiĝis la projekto FUTBESP kies celo estas malfermi pordon al la junuloj. Ĝi fontis el propra sperto kaj celas disvastigi studadon de Esperanto, plimulti la iniciatemon de la asocio, doni al la junuloj pli bonan estontecon kulture kaj sporte; ĝi ankaŭ donas la okazon krei kaj revizi kaj realigi revojn per Esperanto. FUTBESP signifas aldoni sportan

okazon, kiu faciligas ĝui kaj interŝanĝi konojn, ankaŭ kun esperantistoj de aliaj lokoj; ĝi permesas al la partoprenantoj lingve kreski. Ni memoru ke la tempoj ŝanĝiĝas kaj nia asocio bezonas profundigi en novajn metodojn kaj agojn. La futbalo montras nian amon al Esperanto. Tiu ĉi universala sporto estas la plej bona maniero eltrovi personojn kun potencialo ankaŭ por lerni. Esperanto bezonas amon, volon, veron, sindediĉon kaj persiston. FUTBESP ankaŭ riĉigos nian kulturon, ĉar ĝi estas radiko de tiu ĉi mirinda lingvo. / DANIEL RODOLFO REYES CAÑETE



RADIOAMATOROJ. La pasintan 20-an de septembro okazis Asembleo de la tri specialaj radioklubo de radioamatoroj inter kiuj estis ni, la esperantista radioklubo de KEA. Ĝi okazis en UCI (Universidad de las Ciencias Informáticas) interalie ni decidis organizi radian aranĝon en Camagüey kadre de JuSKA, kaj finpretigis la peton por la grupa voksigno de nia radiostacio en KEA. La Junulara Sekcio de KEA (JSK) kaj radioamatoroj kunlaboras por teknike faciligi organizadon de "Silenta Diskejo", tio estas diskejo en kiu oni elsendas muzikon per mallongaj ondoj kaj ĉiuj aŭskultas la muzikon uzante aŭskultilojn, poŝtelefonojn aŭ radiojn tiel ke ĉiuj aŭdas la saman muzikon en la sama frekvenco kaj oni evitas brui. La unuaj testoj estis sukcesaj. Eble dum JuSKA ni faros la unuan grupan teston. / Javier RAMOS NISTAL



ESPERANTO ĈE ANCI. Sabate, la 23-an de aŭgusto, geedzoj Roberto Núñez Silva kaj Sonia González Morales, estraranoj de la Provinca Filio de KEA en Havano organizis renkontiĝon kun la Nacia Asocio de Blinduloj (ANCI) en ties sidejo de Centra Havano, kiun ĉeestis trideko da partoprenantoj, el kiuj duono estis Havanaj esperantistoj. La renkontiĝo okazis kun partopreno de Doralina Morris, prezidantino de ANCI en Centra Havano kaj Alberto Fernández-Calienes Barrios, prezidanto de KEA. Post mallonga prezento de la fono kaj laboro de ambaŭ asocioj, okazis interŝanĝo de kantoj kaj poemoj en la hispana kaj Esperanto. KEA proponas E-kursojn por vidhandikapitoj, ebleco kiu certe fariĝos bona alternativo por praktika uzo de la libera tempo kaj kiu ankaŭ malfermos pliajn pordojn al la interesitoj. Entute tre bona iniciato, kiu signis la finon de la someraj aranĝoj de la Provinca Filio de KEA en Havano. Radiojurnalistoj ĉeestis kaj Radio Ciudad de La Habana elsendis raporton. / Javier RAMOS NISTAL

NOVAJ KURSOJ. En la orienta provinco Granma la filio de KEA komencis la regulan kurson de Esperanto la 6-an de septembro kun 10 gelnantoj el la distriktoj Bayamo, Río Cauto kaj Cauto Cristo. Aldone, instruisto Rafael Cabrera ekinstruis gramatikan kurson kun kvar lernantoj, ĉiulunde vespere. De la 10-a ĝis 13-a de septembro Cabrera kaj Anyer vizitis la najbaran distrikton Niquero kie ili kontaktis kun la radiostacio Portada de la Libertad kaj la televidstacio por disvastigi esperanton kaj la novan kurson. En la radiostacio Cabrera interŝanĝis kun Juan Luis Aldana Muñoz, ĵurnalisto de la radio kaj la informadestro, kiuj akceptis la proponon disvastigi la esperantistan agadon. Krome, ili afiŝis informojn en kelkaj publikaj lokoj de la urbo. Tuj sekve ili vojaĝis al la regiono Cabo Cruz kun la sama celo kaj kontaktis kun la loĝantaro. Ili disdonis informilojn en aliaj ĉirkaŭaj distriktoj kaj starigis afiŝojn kun anoncoj pri Esperanto. / Anyer MONTERO RAMOS

Konsciigo: por pli efika informado (I)

Kompilis: Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

Longa estas la historio de informado pri la Internacia Lingvo. Estis tempo, kiam ne ekzistis landaj aŭ aliaj organizaĵoj kaj kiam ĉio dependis de la iniciato de unuopuloj. La informado estis ofte nomata "propagando". Eĉ nomoj de E-organizaĵoj entenis tiun vorton. Troviĝadis multaj realismaj taksoj de la siatempa lingva situacio kaj objektivaj informoj pri la Internacia Lingvo, sed certe ne forestis fantaziaĵoj sen kia ajn bazo en la realo.

Tiuj lastaj, kvankam certe bonintencaj, tamen ofte kaŭzis tian kompromitiĝon de la E-movado aŭ eĉ de la ideo mem de komuna lingvo, ke en multaj kazoj tutaj regionoj aŭ medioj restis fermitaj dum longaj periodoj por kia ajn pozitiva laboro. Post la Dua Mondmilito, paralele kun la ĝeneralaj klopodoj restarigi la movadon el la ruinoj kaj adapti la organizan strukturon de UEA al la novaj cirkonstancoj, komenciĝis la klopodoj organizi la informadon kaj konformigi ĝian karakteron al la postuloj de la moderna mondo. UEA refondis sian "propagandan fakon" en Bournemouth (1949),

sed jam dum la Universala Kongreso en Parizo (1950) transformis ĝin en Informan Fakon.

La Estraro de UEA okupiĝis pri la demando, kiamaniere plibonigi la informadon. Tiurilate la Principaro de Frostavallen estas valida ankaŭ hodiaŭ.

Ĝi konsistas el 9 mallongaj ĉapitroj kun 21 punktoj (vd. la broŝuron "Statuto kaj Regularoj de UEA", 1968, paĝoj 58-62). Tiu ĉi dokumento devus esti plej atente tradudita de ĉiu landa informa fako kaj entute de ĉiu persono, kiu deziras efike kaj celtrafe helpi al disvastigo de la Internacia Lingvo per kiu ajn rimedo de informado.

Pri la Principaro de Frostavallen el 1956: "La ĉefa konkludo de tiu baza dokumento pri informado ne perdis sian aktualecon. Por sukcesa informado necesas profundaj konoj kaj klara konscio pri la valoro de la fenomeno Esperanto. Nur per sufiĉaj scioj oni povas kuraĝe kaj konvinke argumenti kontraŭ eraraj prezentoj. Tial la unua tasko de informanto estas informi sin mem, kaj tiu lernado neniam ĉesas."

Indiĝenaj voĉoj: alia koncepto de evoluo (I)

Kompilis: Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

Okaze de la Internacia Tago de Indiĝenaj Popoloj, la 9-an de aŭgusto, kiu estis proklamita de Unuiĝintaj Nacioj en decembro 1994 kaj unufoje prifestita en 1985, pasintjare la ĝenerala sekretario de UN Ban Ki-moon sendis mesaĝon al la mondo en kiu li reliefigis ke, ekde la adopto antaŭ kvin jaroj de la Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj, unuopaj indiĝenoj kaj indiĝenaj grupoj utiligas tradiciajn kaj novajn amaskomunikilojn por paroli pri si kaj aŭdigi sian voĉon, sed en vero oni devas diri ke tio ankoraŭ ne sufiĉas.

La kaŭzo de indiĝenaj voĉoj kaj popoloj estas ankaŭ implice kaŭzo kiu devas interesi geesperantistojn pro la fakto ke ni iel estas portantoj de lingva konscienco, defendantoj de lingva egalrajto kaj pro tio indas ke ni ĉiuj lernu kaj klariĝu pri la temo.

Por la kubanoj, tiu ŝajne povus esti ne grava temo, tamen, pro la fakto ke niaj praaŭoj kaj indiĝenoj estis tiel draste forpelitaj aŭ mortigitaj pro diversaj kialoj kaj manieroj, samkiel en nia granda patrolando, la amerikaj teroj, estas oportune iel rigardi nian indiĝenan pasintecon.

Kuba Esperanto-Asocio
Apartado 5120, 10500 La Habana, Cuba
+53 7 640 4484
info@esperanto.cu.cu
www.esperanto.cu/cu



esperanto.cu estas trimonata eldonaĵo por komitatanoj, estraranoj kaj aktivuloj de KEA. PDF-versio elŝuteblas.

Redaktis: Maritza Gutiérrez, Alberto F. Calienes, kaj Javier Ramos.

Enpaĝigis: Y. Mayol kaj Alberto F. Calienes.

